

KATALUNA ESPERANTISTO



OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO
numero 256 (23) - kvina epoko - junio 1988



BARCELONO

INTERNACIA LITERATURA FORUMO
INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

29a OKTOBRO / 1a NOVEMBRO 1988

LEGU

- 2-KASISTAN ALVOKON+KORESPONDADON
- 3-ILF + IFL
- 4-LIBROJN POR BLINDULOJ
- 5-EŬROPAN RUBRIKON + ENKETADON
ĈE GIMNAZIOJ
- 6-NIAN AGADON ĈE UNESKO
- 7-NIAN AGADON + KONKURSAĴOJN POR
28aj IFL
- 8-FESTPAROLADON LAGRANGE

ASSOCIACIÓ CATALANA D'ESPERANTO/KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO (Enregistrita far la "Generalitat de Catalunya" en la unua Sekcio je n-ro 5785), Apartat de Correus, 32318, 08080 Barcelona, Catalunya/Katalunio, telefonnumero (93) 716 36 33.

KOTIZOJ POR LA JARO 1988: Individua Abonanta Membro 1600 p-toj; Individua Subtenanta Membro 3200 p-toj; Individua Dumviva Membro 32.000 p-toj; Kolektiva Membro 3200 p-toj.

BANKO: Caixa de Pensions "La Caixa". Agència 461. Pintor Vila Cinca, 08208 - Sabadell, Kontonumero 550-53.

PLENUMKOMITATO DE KEA: **Prezidanto:** Jordi Carbonell i Pinyol; **Vicprezidanto:** Maria Garcés i Coll; **Ĝenerala Sekretario:** Llibert Puig i Gandia, Apartat 290, tel. 716 36 33, 08200 Sabadell; **Kasisto:** Hèctor Alòs i Font; **Komitatajnoj:** Josep M^a Serrano, Josep Franquesa, Bartomeu Costa, Narcís Fluvià, Joan R. Guifón, Ĝirona Espero, E-Grupo "C.E. Puigcastellar".

KONTROLA KOMISIONO: Tomàs Alberich; Ricard Jordana; Òscar Puig.

KONSERVANTARO DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ:

PREZIDANTO: Gabriel Mora i Arana, Perla Ari Martinelli, Jordi Carbonell i Pinyol, Manuel Casanoves i Casals, Bernard Golden, Salvador Gumà i Clavell, Miguel Gutiérrez Adúriz, Giorgio Silber.

SEKRETARIO: Joan Ramon Guifón i Roset.

JURIO POR LA 28aj INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ en la jaro 1988a PREZIDANTO: Gabriel Mora i Arana, Perla Ari Martinelli, Jordi Carbonell i Pinyol, Manuel Casanoves i Casals, Salvador Gumà i Clavell, Miguel Gutiérrez Adúriz. **SEKRETARIO:** Joan Ramón Guifón i Roset.

FLORLUDAJ MAJSTROJ: Clarence BICKNELL (3aj IFL, Olot, 1913), Artur DOMÈNECH i MAS (6aj IFL, Reus, 1916), Josep GRAU i CASAS (6aj IFL, Reus, 1916), Marian SOLÀ i MONTSERRAT (6aj IFL, Reus, 1916), Josep VENTURA i FREIXAS (8aj IFL, Girona, 1921), Jaume GRAU i CASAS (9aj IFL, Manresa, 1923), Bernard GOLDEN (20aj IFL, Vilanova i La Geltrú, 1980), Giorgio SILFER (24aj IFL, Olot, 1984)

PEDAGOGIA KOMISIONO: Manel Marqués, Abel Montagut, Josep Tordera, Joan Torres, Lluís de Yzaguirre.

VORTARA KOMISIONO: **Sekretario:** Jordi Carbonell, Avda. del Paral·lel, 96-6è. Tel. 329 24 81 - 241 94 11, 08015 Barcelona.

KOLEKTIVAJ MEMBROJ: Centre d'Esperanto Sabadell, Apartat, 407, Papa Pius XI, 130. Tel. (93) 716 36 33, 08200 Sabadell; Centre d'Estudis de la Biblioteca-Museu Balaguer/Esperanto-Grupo St.Gervasi, 45, 08800 Vilanova i la Geltrú (Garraf); Centre Excursionista Puigcastellar/Esperanto-Grupo, St.Josep, 20, 08922 Sta.Coloma de Gramenet (Barcelonès); Club d'Amics de la Unesco de Catalunya/Departament d'Esperanto, Mallorca, 207 - pral. Tel. (93) 253 95 07, 08036 Barcelona; Esperanto-Fako "Institut de Batxillerat", Camí Reial València, 08860 Castelldefels (Baix Llobregat); Esperanto-Fako "S.C. Joventut Terrassenca", St.Francesc, 52, 08221 Terrassa (Vallès Occidental); Esperanto-Grupo Castelldefels, A. Einstein 1, 1.3, esc.B, 08860 Castelldefels (Baix Llobregat); Esperanto-Grupo "Jozefo Anglés", Apartat 336, 08190 Sant Cugat del Vallès (Vallès Occidental), Firma Tero, Esperanto-Fako Centre Comarcal Lleidatà, Gran Via, 592, 08007 Barcelona; Grup Esperantista Sant Pau d'Ordal, Dr. Zamenhof, 12, Tel. 899 3003, 08739 Sant Pau d'Ordal. Ĝirona Espero, Apartat, 509, 17080 Girona; Hispana Esperanto-Fervojista Asocio ĉe Stacidomo Sans Barcelona.

KOMARKAJ DELEGITOJ

Alt Penedès, Baix Penedès, Garraf: Joan Inglada i Roig. Sant Magí, 20. 3r. Tel. (93) 893 71 76 - 08800 - Vilanova i la Geltrú (Garraf).

Garrotxa, Ripollès: Joan Torres i Nalda. Escola Llar, Ctra. de la Canya s/n. Tel. (972) 26 38 29 - 17800 - Olot (Garrotxa).

Gironès, Alt Empordà, Baix Empordà, La Selva: Ĝirona Espero, Apartat - 509, 17080 - Girona (Gironès).


Tarragonès, Alt Camp, Baix Camp: Josep M^a Serrano. Edifici Europa B-2-1 (St. Pere i St. Pau). Tel. (977) 21 89 41 - 43007 - Tarragona (Tarragonès).

Baix Ebre, Montsià: Josep M^a Altadill. Berenguer IV, 23. Tel. (977) 44 20 09 - 43500-Tortosa (Baix Ebre).

Catalunya Nord: Joan Fernández. 21 rue Henri Matisse. F-66000-Perpinyà (Rosselló).

KASISTAN ALVOKON

bonvolu ne forgesi kaj helpu nian administradon per rapida pano de via ĉi-jara kotizo rekte al la adreso de nia Asocio. Se vi ankoraŭ ne sendis al nian bankrajtignon kaj vi tamen konsentas pri la trabanka enspezado de viaj kotizoj, estos al vi pli facile informi nin telefone pri via bankkonto ĉiu labortago ekde la 20a ĝis la 22a h. ĉe nia sekretariejo. Ni antaŭdankas vian favoran reagon.



DEZIRAS
KORESPONDI

Kun geamikoj pri ĉiuj temoj:
Jaromir Hinčica, Sládkova, 27a
702 22 OSTRAVA-1, Ĉeĥoslovakio.
31-jaraĝa kolektanto de pm.kaj
bk.Li respondos al ĉiuj.

Por interŝanĝi pensmanierojn kaj
travivaĵojn, krome bk.kaj diver-
saĵojn, skribema ĉeĥa junulo:
Ludvik Klima, 34162 Zichovice, 8
Ĉeĥoslovakio.

Germana samideano kiu interesi-
ĝas pri ĉiuj temoj: Uwe Fleischen
Otto-Winzer-strasse, 90, 1142
BERLIN, G.D.R.

Pola junulino 38-jaraĝa kun ga-
jajn samideanojn. Si ŝatas lite-
raturon, poezion kaj muzikon:
Elizabeta Grzebień, Nowodworska,
105/31, 54-438 WROCLAW, Pollando.

20-jara hungara knabo pri ĉiuj
temoj: Antal Turzó, ZSOMBO, Fels-
zabadulás út 70, H-6792, Hungario.

INTERNACIA LITERATURA FORUMO
INTERNACIA FLORAJ LUDOJ

29a OKTOBRO / 1a NOVEMBRO 1988


Estas facile rimarkebla la pozitiva lingvo-evoluo de Esperanto dum ĝia unua jarcento kaj tio eblis memevidente pro la kontribuo de la verkistoj, la veraj ĵonglistoj de la vortoj kaj esprimoj, kiuj grandparte sukcesas enradikiĝi en la normala uzo de la Esperanto-komunumo.

Per si mem tio pravigas la gravecon de aranĝoj literaturaj kiel tiu okazonta ĉe ni, kiu nepre meritas kaj bezonas la ĉeeston de ĉiuj membroj de nia Asocio. La Klubo de Amikoj de la Unesko fariĝos la Forumejo kie okazos la plej granda parto de la programo, sed tamen ni antaŭvidis okazigi la Internaciajn Floraj Ludojn kaj la omaĝon al nia pioniro Delfí Dalmau en la salono "de Cent" de la Urbodomo.



Nikolin': nova voĉo de la esperanto-kanzono

La kompletan programon kaj aliĝilon de la Forumo vi ricevos kun la venonta revuo komence de septembro. Jam de nun tamen rezervu la lastan oktobran semajnfinojn en via kalendaro.



BARCELONO

BARCELONO, LA KATALUNA ĈEFURBO,
MALFERMOS DENOVE SIAN PORDON
AL INTERNACIA ARANĜO ESPERANTISTA.
ESTU ĈIUJ BONVENAJ!!

Antaŭ kelka tempo venis al miaj manoj belege dika katalogo (Barcelona 1987) eldonita de O.N.C.E. Trafkompleta universala kulturo (pli ol 500 titoloj, plejparte plurvolumaj) brajle verŝita en la kastilian en la unuaj eldonaj tempoj kaj ekde la kataluna politika renaskiĝo en nian lingvon kun progresiva ofteco.

Klasikuloj (Aristotelo, Ŝekspiro, Moliéro, Goeto...), modernuloj (Kafka, Rilke, Faulkner, Pavese...), hispanoj (Cervantes, Quevedo, Lope, Tirso, Lorca, Baroja...), hispanamerikanoj (Borges, Carpentier, Cortázar, Garcia-Márquez...), katalunoj (Joanot Martorell, Espriu, Rodoreda, Villalonga, de Pedrolo... eĉ "Ofèlia Dracs"!).

Mi restis mirigita vidante tradukojn de "A la recherche du temps perdu" kaj en la katalunan kaj en la kastilian!

Kvankam la katalogo estas esence beletra, per ĝia enhavo oni povas lertiĝi pri komerca kalkulo, sekologio, informadiko, hejma ekonomio, ŝakoj kaj tre diversa ktp. Ampleksa aneksaĵo entenas muzikajn partiturojn ĉiuspecajn. Krome, niaj blinduloj povas sekvi la EGB-, BUP-kaj FP-kursojn, ĉar en ĝi svarmas la baza lecionaro en la kataluna, kiu tion ebligas.

Ni esperantistoj povas fieri pri la ok volumoj (n-ro 32) de "Esperanto" (Gramatiko, Ekzercaro kaj Vortaro) de Manuel Caplliure kaj pri la dek volumoj (n-ro 445) de Plena Analiza Gramatiko de Kalocsay-Waringhien distribuita al la blindularo tutmonda el Barcelona. L.I. B.E. financis kaj nia kataluna samideano Gómez Ibarz estis la ĉefa prizorganto de tiu ege lanta kaj komplika laboro -ni diru monaĥa, ne forgesu ke PAG uzas almenaŭ dek litertipojn!-.

Ĉu la neblinda publiko konas tiun laŭdindan strebon? Bedaŭrinde multaj homoj kaj hazarde, kiel mi -nun vi, legantoj-, ĉar la kutimaj kanaloj facile alireblaj (kiujn la nevidhandikapuloj tradicie legas) ne mencias ĝin.

Petite miaflanke Raymond Gonin, redaktoro de Esperanta Ligilo, oficiala la organo de L.I.B.E. malkovris al mi iom el la enhavo de la LIBE-libroservo, nome:

Perfektigaj lernolibroj, kiel "Por la praktikantoj" de J. Babin, la fama "Paŝoj al plena posedo" de W. Auld, "Esperantonimoj" de M. Ĝivoje aŭ la menciita PAG; movadlibroj, kiel "Historio de Esperanto inter la blinduloj" de J. Kreitz (originala kaj sole ekzistanta brajle), "Historio kaj organizaĵo de la Esperanto-movado" de Isbrücker; poeziaĵoj, kiel "Infero" el la "Dia Komedio" de Danto-Kalocsay, "Estona soveta poezio" trad. de H. Dresen, "Tra itala poezio" kompilita de G. Azzi; romanoj kaj novelkolektoj, inter ili la lingvoinstrua romanlibreto de C. Piron "Gerda malaperis". Krome la katalogo entenas diversajn kajerojn pri ludoj de R. Gonin (ne ekzistantajn en ordinara skribo).

Tiuj eldonaĵoj estas akireblaj ĉe la LIBE-kasisto: s-ino N. Reinders, Zwaansmeerstraat, 48, 1946 A E BERVERVIJK (Nederlando).

Karbero Kernó



La Plenumkomitato de KEA deziras al siaj membroj kaj legantoj plej feliĉan kaj ripozigan feriadon.

EŬROPA RUBRIKO

ENKONDUKE

De antaŭ kelkaj jaroj aperis kerno de agado esperantista celanta la Eŭropan Komunaĵon, kiu tamen ankoraŭ ne sukcesis krei koheran organizaĵon, sed la iniciato ekzistas kaj tiu poreŭropa agado malrapide disvastiĝas en nia movado.

Lastatempe nia Asocio interesiĝis pri la evoluo de tiu agado kaj pri la plej aktuala stato de la afero kaj per la ricevita dokumentaro ni informiĝis ke la ĝisnuna agado estis ege modesta kaj la atingoj same modestaj.

Ĉar ni taksas la aferon tre grava kaj urĝa, en lasta kunveno de la Plenumkomitato de nia Asocio, ni decidis kunlabori al tiu eŭropa agado, interalie per rubriko en nia revuo kaj per starigo de specifa komisiono se kunlaborantoj aperas. Bonvolu priatenti nian tiurilatan alvokon en tiu ĉi sama rubriko.



Jen vidaĵo de la mirinda Eŭropa Parlamentejo.

ALVOKO

Se vi pretas agi en speciala komisiono kiu laboros nur sur la kampo de eŭropa kunagado, bonvolu vin anonci rekte al nia prezidanto s-ro Jordi Carbonell tel. 241.9411 (dum laborhoroj).

ENKETADO ĈE GIMNAZIOJ

Laŭ propono de Itala Instituto de Esperanto kaj de ties gvidantino s-ino Elisabetta Formaggio, ni aranĝis enketadon ĉe katalunaj mezgradaj lernejoj per enketilo ricevita de la iniciatintoj kiu titoliĝis "Demandaro pri la opinio de la gejunuloj rilate al la lingva interkompreniĝo en la mondo". Ni sukcesis enketi ĉe 4 gimnazioj en Blanes, Manlleu, Vilafranca del Penedès kaj Barcelono, danke al la kunlaboro de niaj samideanoj P.M. Martin Burutxaga, Bartomeu Costa, Abel Montagut kaj Jordi Carbonell, kiun la PK. tre el-kore dankas.

Entute ni ricevis 467 enketilojn kaj 128 el ili (27 %) deziras pluinformiĝi pri Esperanto. Principe nia semado aŭguras fruktodonan rikolton, ĉar post la enketado en Manlleu ni estis ĝentile invititaj de la direktoro de la tiea gimnazio rekte informi kaj prezenti



ekspozicion. Tio okazis la 9an de majo fare de nia ĝenerala sekretario Llibert Puig kaj de la junaj aktivuloj Francesc Gobierno kaj Adolf Pomar. Ni fidas ankoraŭ pri novaj atingoj rezulte de nia enketado, pri kiuj ni tre volonte informos nian legantaron. Ankaŭ ni informos venonte pri la rezulto de la kompleta enketado je eŭropa nivelo kiu okazis samtempe en pluraj landoj.

NIA AGADO



LA KLUBO DE AMIKOJ DE LA UNESKO DE KATALUNIO brile kontribuis al la Jubileo de Esperanto per altkvalita literatura aranĝo okazinta la 9an de novembro 1987a. Enkondukis la programon nia kara samideano Miquel Vi-lagran, gvidanto de la tiea Esperanto-Grupo, sekvis interveno de la prezidanto de la Klubo Josep Martinez de Foix, mem individua membro de KEA kaj tuj sekve prelegis nia aktiva samideano kaj nuna prezidanto de la Internaciaj Floraj Ludoj, Gabriel Mora i Arana, pri temo rilate la katalunan literaturon kaj finis per legado de sia esperanta traduko de la poemo "Parauls per la Pau" de la eminenta kataluna poeto Miquel MARTÍ I POL, kiu mem prezidis la aranĝon.

Sekvis legado de la originala katalunlingva poemo fare de la verkisto Lluís Gassó kaj finiĝis la aranĝo per legado de salutmesaĝo de la poeto.

Pro la intereso de la poemo kies temo rekte tuŝas la esencon mem de la esperantismo, ni reproduktas kaj originalon kaj tradukon por ke ĉiuj legantoj de nia revuo tra la mondo ĝuu same kiel ni la tre inspiritan poemon.



PARAULES PER LA PAU

Només perdura allò que bastim amb esforç
i creix en l'esperit dels homes i dels pobles
fins a esdevenir l'àmbit on tota veu ressona.
Així la pau, que es guanya tenaçment cada dia
pel desig de voler-la més que tota altra cosa
i és el mirall que fa possibles tots els somnis.
Parlo de pau en pau, des d'aquest temps que em toca
de viure i de sofrir, des de la meva altura
d'home senzill que creu que la pau és possible,
des de l'amor profund al poble i a la llengua
que m'han fet el que sóc i em serven i m'impulsen.
La tarda és un espai de lentituds perdudes
que se m'adorm als ulls plàcidament i clara.
D'aquest silenci estant proclamo l'esperança,
la pau no és un do ni un cim inassolible
sinó el recomençar de moltes primaveres,
la voluntat i el risc d'estimar i de comprendre.
Tota la vastitud dels anys i el seu misteri
ressona en les paraules que escric perquè serveixin
de bandera i d'escut, de fita i de disegni.
Més que amb l'eco estrident de timbals i trompetes
que senyoreja edats i vulnera silencis,
més que amb tot l'aldarull dels cants victoriosos
que ofeguen el lament dels desvalguts i els febles,
i més que amb el menyspreu groller dels prepotents
que es proclamen hereus de totes les riqueses,
falquem l'ara i l'aquí, convençuts i solemnes,
amb un anhel de pau que encengui les mirades.
Pensem en el futur des de l'ara que esclata
dins i fora de tots, i fem amb les paraules
un reducte de llum que en preservi la força.
Vulguem la pau en pau, sense cap mesquinesa,
perquè en l'ordre del temps només creix i perdura
tot allò que bastim amb esforç, i secunda
la sang i l'esperit dels homes i dels pobles.

Miquel Martí i Pol

VORTOJ POR LA PACO

Nur senfindaŭras tio klopode konstruata
de l' homoj kaj popoloj, kreskanta en l' animo
ĝis fariĝadi spaco kie la vort' resonas.
Tiel, la pac', gajnita per strebo ĉiutaga,
prefere dezirata pli ol afer' alia,
spiegulo estas kiu ebligas ĉiun revon.
Enpace mi parolas pri pac' de l' tempo nuna
kiun travivas pene mi el devoloko
de simpla hom' kredanta je paco plene ebla
pro la profunda amo al lingvo kaj popolo
kiuj elformis min kaj gardas min kaj puŝas.
La posttagmezo plenas je malhasteco svaga,
pac-hele dormiĝanta en la okuloj miaj.
De la silent' rezulta l' esperon mi proklamas:
la pac' ne estas graco nek pint' neatingebla,
sed la rekomenciĝo plurfoja de l' printempoj,
la volo kaj la risko pri amo kaj kompreno.
La tuta jarvasteco kaj la mistero ĝia
efias en miaj versoj por ke servadu ili
kiel standard' kaj ŝildo, aŭgur' kaj limŝtono.
Pli ol per l' akraj sonoj tamburaj kaj trumpetaj
super epokoj, kaj vundantaj la silenton;
pli ol per kribruado fare de l' venkokantoj
kiuj sufokas plendojn de feblaj senhelpuloj;
kaj pli ol per krudeca malŝat' de l' potenculoj
kiuj proklamas sin plenrajtaj pri l' riĉaĵoj.
la nunon ĉi-tiean kojnu ni firm-solene
per pac-dezir' kapabla rigardojn ekbruligi.
Ni pensu pri l' estonto el nuno disfloranta
en ni kaj ekster ni, kaj faru ni per vortoj
luman reduton kiu la forton ĝian firmu.
Enpace amu pacon ni, kore prodigemaj,
ĉar en la temp' nur kreskas kaj postvivadas tio,
kion klopode ni konstruas ĝermigante
la sangon kaj spiriton de l' homoj kaj popoloj.

Miquel Martí i Pol

El la kataluna esperantigis
Gabriel Mora i Arana



FIRMA TERO

ATEE

En la plej nova barcelona Esperanto-Grupo okazis dimanĉon la 19an de junio vespere, kursfina festo enhavoriĉa. Unuakta teatraĵo, pluraj kantadoj: kataluna kaj esperanta, disdono de insignoj al la kursfinintoj kaj prezento de la priteatra libro "Tri aŭtoroj kaj mi". La prezidanto de KEA salutis la ĉeestantojn nome de nia Asocio. Gratulojn!

Ĝi estas la angla siglo de la Asocio por la Klerigo de Instruistoj en Eŭropo, kiu okazigos en Barcelono ĝian 13an Konferencon de la 4a ĝis la 9a de septembro ĉi-jara. La prezidanto de la Konferenco fariĝis nia kara samideano Ricard Jordana al kiu ni deziras la plej brilan sukceson.

LISTO DE VERKOJ, KIUJ KONKURAS EN LA 28AJ INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

PREMIOJ ALJUĜOTAJ: (ROZ)O; (EGL)ANTERIO; (VIO)LO; (F)REDERIC-(P)UJULÀ-(V)ALLÈS; (AMA)RANTO; (J)AUME-(G)RAU-(C)ASAS; (A)RTUR-(D)OMÈNECH-(M)AS; KAJ NATURA FLORO.

VERKO PREMIO TITOLO



1001	ROZ	GEA SOLECO			
1002	ROZ	ARETUSA			
1003	ROZ	ZOJA			
1004	ROZ	MULTE DA DEZIROJ			
1005	ROZ	IMPRESOJ DE AŬTUNA POSTTAGMEZO			
1006	ROZ	LETERO AL HISPANA AMIKINO			
1007	ROZ	RENDEVUO			
1008	ROZ	KVAZAŬ EN MIRAĜ'MAGIA			
1009	ROZ	L'AMO HAVAS TUTE VIVON			
1010	ROZ	SEN VI			
1011	ROZ	ONI DIRAS, KE...			
1012	ROZ	POST DEK JAROJ (AL MIA EDZINO)			
1013	ROZ	AMA VERSAĴO			
1014	ROZ	MEZNOKTA FLORO			
1015	ROZ	AMO			
1016	ROZ	ADORO			
2001	EGL	MAZDAĴETOJ			
2002	EGL	MAZDAĴETOJ			
2003	EGL	ĈIUTAGE, ĈIUHORE			
2004	EGL	MEMORO PRI ZAMENHOFO			
2005	EGL	LUMO			
2006	EGL	AKVOHAŬTO			
2007	EGL	NEĜO			
2008	EGL	ESPERANTO			
2009	EGL	LA UNUA DE APRILO			
2010	EGL	NAJBARA HUNDO			
2011	EGL	PRINTEMPO-TRIPTIKO			
3001	VIO	PORVETA AVENTURO			
3002	VIO	NUR ĜIS TIAM			
3003	VIO	PLEJBELA ROZO...			
3004	VIO	FLUGO DE PENSO PAŜU BRILA!			
3005	VIO	L'ABIO KAJ LA FONTO			
3006	VIO	20-JARCENTA PETEGO			
3007	VIO	KUN LEVITA KAPO			
3008	VIO	NENIU DEMANDU PLU...			
3009	VIO	FABELO PRI RATA REĜO			
3010	VIO	EL LA LIBRO DE LA VIVO			
3011	VIO	FIDO NOVA			
4001	FPV	SOMERO EN VILAĜO			
4002	FPV	HELENA KAJ PETRO			
4003	FPV	SKANDALOJ, SKANDALOJ			
4004	FPV	NIMFEO			
4005	FPV	LA ŜIPĈARPENTRISTO			
4006	FPV	MINKO KAJ KALINKO, MIKA KAJ IGLIKA			
4007	FPV	INSTRUISTO FLAV RAKONTAS PRI...			
4008	FPV	BRILA SORTO			
5001	AMA	VERDESKAJ PENSOJ			
5002	AMA	FLORON ONI DONAS POR AMO			
6101	JGC	PROVO DE KANTIKO EN LA TEMPLO			
6102	JGC	DON JAUME EN SANT JERONI			
6103	JGC	LA VIZITO DE L'MONAĤINOJ			
6201	JGC	VESPERO EN KINEJO			
7101	ADM	EL GUARDA-GAVINES			
7201	ADM	VOLUPTUOSITAT			
7202	ADM	LA PRIMERA MENTIDA			

LISTO DE VERKOJ, KIUJ KONKURAS EN LA 1A KATALUNIA KONKURSO "NOVA FUTURO" POR KOMENCANTOJ KAJ NOVAJ LERNANTOJ DE ESPERANTO
PREMIO ALJUĜOTA: (GAL)ANTO: PROZA

8201	GAL	GEORGO KAJ LA PSEŬDO-SI
JOAN RAMON GUIÑÓN I ROSET		
SEKRETARIO DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ		

Jen la 3a kaj
antaŭlasta par-
to de la fest-
parolado de
Georges Lagran-
ge dum la 27aj
Internaciaj
Floraj Ludoj.



La superaj klasoj estis du ling-
vaj, oni parolis okcitane al la
lakeoj, al la kamparanoj, kiuj
pri laboris la teron, sed inter
si ili jam uzis la francan. (1)
Tiu kurioza, klasa dulingvismo
daŭris ĝis la komenco de la XXa
jarcento kaj paradokse la publi-
ka, deviga kaj demokrata instru-
ado estis plia kaj definitiva
bato al la okcitana.
Temis pri vera kultura kaj ling-
va ekstermado: en la lernejoj
ne nur oni instruis la francan,
ignorante la okcitanan, sed krome
oni praktikadis la denuncon, la
"bovino".

Kio estis?? La instruisto, dum la
paŭzoj trudis objekton humiligan
nomatan "la bovino" (estis ekzem-
ple lignoŝuo aŭ speciala ŝtono)
al la unua infano kiu "kulpis"
kialekto-uzon ludante (fakte li
simple parolis hejman lingvon!!)
Kaj la kulpigito devis siavice
trudi la "bovinon" al alia kama-
rado, kiu same kulpis kaj tiel
plu ĝis la vespero. Kaj la lasta
kiu havis enmane la "bovinon"
estis punita.

Per tia metodo kaj kelkaj simi-
laj oni atingis ke la homoj
hontis pro sia lingvo. Hontigi
homojn pro ilia lingvo, tio
estas la plej efika rimedo por
mortigi lingvon.

Poste estis ankaŭ la militservo:
la junaj rekrutoj nepre devis
uzi komunan lingvon kun la aliaj
kamaradoj. Tio pli ke oni zorge
intermiksas ilin. Kaj komprene-
ble estis malpermesite uzi dia-
lekton en la kazerno!!!

La turismo el la nordo al la su-
do kaj hodiaŭ la nacia televido
frapis la lastajn batojn al la
okcitana.

Honeste oni devas diri, ke en
nur la politiko ludis kontraŭ
la sudo: estas ankaŭ geografiaj
kaŭzoj. En la nordo estas la
grandaj ebenaĵoj riĉe akvumitaj
de la atlantikaj pluvoj. La ebenaĵoj
tritikoriĉaj, la ebenaĵoj kun riĉaj
herbejoj kaj grasaj bovinoj.

La sudo estas ofte monteca, rok-
eca kaj tro seka.
En la nordo estas geografia unu-
eco ĉirkaŭ la t. n. "pariza pelvo"
al kiu konverĝas ĉiuj vojoj.

La sudo malhavas unuecon: Marsejlo
rigardas al oriento, Bordo al
Anglio, Tuluzo al Hispanio, kaj
montanoj al siaj montoj, kaj en
la mezepoko neniam estis politi-
ka unueco de la sudo.

Kio restas, fine en Francio el la
glora tempo de la trobadoroj??
Jes restas la vorto "amour". Tiu
vorto ne estas franclingva, sed
citana. Ni heredis ĝin de la
trobadoroj.

Jes, ankoraŭ en foraj vilaĝetoj
izolitaj, kelkaj maljunuloj paro-
las plu inter si la dialekton,
nur por praktikaj celoj. Kaj ili
hontas antaŭ la parizanoj. Ili
konscias, ke ili uzas "jargonon"
Jes, kelkaj junuloj provas reviv-
igi la lingvon da siaj geavoj.
Sed tion farante ili havas teru-
ran francan akcenton kaj ili ne
kapablas interkompreniĝi. Nur
folklorajo. Kiel tiuj indianoj de
Nordameriko, kiuj surmetas plu-
mon por la turisto.

Jes, ankaŭ, de du dek jaroj esta-
ja verkistoj en la okcitana, sed
verkistoj kiuj elektis tiun ling-
von, de tio ne povas vivi kaj es-
tas ne tre konata. La okcitan-de-
venaj verkistoj plej konataj,
kiel J. Giono aŭ M. Pagnol verkis
france.

Nenio nova en tio cetere, jam en
la Renesanco, Clément Marot aŭ
Montaigne, ankaŭ okcitan-devena,
preferis verki en la linvo de
la reĝo.

Ja, la presado en la okcitana
kostas tro multe. Kaj la legan-
taro estas ne sufiĉe ampleksa..
Do tute same kiel niaj esperant-
verkistoj, ili verkas la lingvo
kiun ili elektis por subteni ĝin
por vivi ĝin, ne kiel popular-
verkistoj. Kurioza paralelo, pr-
kiu ni reparolos poste.

Kio restas, finfine, el tiu glora
tempo?

Nur akcento. Tiu suda akcento
en kiu ni nordanoj, plumpe inte-
miksas Bordo, Tuluzon kaj Ma-
ejlon. Tiu suda akcento, kiun o-
ili provas foriri kaj forgesiĝi
se ili estas iom kleraj, por ne
aspekti tro primitivaj, tro kam-
panaj. Tiu akcento, kiun oni
uzas en la komedioj de A. Pous-
sieu aŭ en la filmoj de M. Pagnol, por
iom gajigi, tiel ke tio estas sen-
tata de la suduloj preskaŭ ra-
cisme. Tiu akcento, kiu sonas por
ni, nordanoj, sune kaj ferie, ĉar
ni emas iri al la suno, al la su-
do por ferii. Kaj ili nomas nin
"les Bronze-cul", la "puĝo-sun-
banantoj", la "sunbanaj puĝuloj".
Kompreneble estis Mistral!!!!
Sed Mistral alvenis kelkajn jar-
centojn malfrue. En la Metroo de
Barcelona, apud "salida" estas
skribite "sortida". Jes la kataluna
lingvo estas savita. En Marsejlo
estas skribite nur "sortie". Mis-
tral alvenis tro malfrue. "Mirejo"
de Mistral estas konata sed en
sia franclingva traduko.

En tiu fino de la XXa jarcento ni
travivas periodon senprecede
en la historio de la homaro, peri-
odo kiu nepre kondukos al mond-
unuiĝo aŭ neniĝo. Tion postulas
la teknologio. Tion diris Einstein.
Tion diris jam pli frue Eŭgeno
Lanti kaj tial elpensis la sen-
naciismon.

La teknologio-ne ideologio-estas
tia, ke ĝi ebligas al ĉiuj homoj
dece vivi kaj samtempe ĝi ĉiujn
minacas je plena ekstermado. Pri
tio mi ja plene konscias.
Cetere la sopiro al monduuiĝo
estas malnova revo, por tiel diri
"edeneca" revo, kiu daŭre fiaskis.
Kial???

La antikvaj imperioj provis parte-
unuiĝi la homaron. Ili ĉiuj disfa-
lis. Ankaŭ la grandaj religioj pre-
tendis unuiĝi la homaron. Ili ĉiuj
fiaskis. Cetere ili estis pluraj
kaj ili inter si konkurencis. Pli
freŝdate la koloniismaj imperioj
provis arigi vastajn teritoriojn.
Sed ankaŭ ili disfalis. Sed tiam
okazis io nova, pri kio ni baldaŭ
vidos...

La modernaj imperiismoj-ĉefe eko-
nomiaj-ankaŭ provas reĝi la mon-
don. Sed bonŝance ili estas pluraj
kaj inter si konkurencas. Kaj ili
klare scias, ke neniu povos sur-
venki la alian. Bonŝance.
Mondunuiĝo, do, jes, sed kiel?

La historio instruas, ke la per-
forta unuiĝo ne povas longe daŭ-
ri. Tiel longe kiel estas subpre-
manto kaj subpremanto, okazas ri-
beloj kaj ne povas reĝi paco.
La solaj unuiĝoj, kiuj povas ja
daŭri estas linvoj inter egaluloj
en harmonia kunlaborado -eĉ se
ne ĉio ideale funkcias en la rea-
leco. En Eŭropo la ekzemplo estas
Svisio en kiu kunvivas tri aŭ
kvar -egalrajtaj-kulturoj. Eŭrono
mem-sub niaj okuloj-post jarcent-
toj da militoj kreiĝadas, inter
egaluloj.

Kaj ĉiel estas evidente por ĉiu
iom saĝa homo, ke hodiaŭ la land-
limoj estas anahronismo, stulta
restaĵo de la mezepoko.

Mi diris pli supre, ke la "aran-
daj linvoj" bazas sian forton
sur politika aŭ ekonomia potenco.
Tio ankoraŭ nun estas vera (vidu
la anlan!) Sed ĉu temas pri eter-
na, neŝanĝebla vero?

Post la dua mondmilito la kolo-
niismaj imperioj (la anla, la
franca, la nederlanda, la portugala...)
devis iom post iom cedi
antaŭ la koloniitaj popoloj. Ne
sen sando, kompreneble. Ili devis
agnoski la ekziston de la alia.
Ili devis lerni la respekton al
la diferenco. Kaj ni vidis iom
post iom ĉiujn minoritatojn de-
postuli sian ekzistrajton.
Tiu fakto estas ĝenerala kaj ĝi
estas nova. Kaj des pli neatendita
en Francio tradicie tiel centra-
lizita.

Jes, la grandaj potencoj devis fin-
fine kompreni, ke la politiko "de-
la kanoniĝo", kiel oni diras, ne
plu sufiĉas: la almeto de militsi-
bo antaŭ la haveno de lando teĥni-
ke neevoluinta ne plu sufiĉas por
trudi avantaĝan komercan kontrak-
ton aŭ politikan protektoraton.
Ankaŭ la malfortan oni devas
iel respekti.



=====PIEDNOTOJ :

(1)-Tiu "paraŝutado" de lingvo en
la superajn klasojn okazis ne nur
en Okcitanio. Bruselo estas franc-
lingva urbo meze de la flandra ter-
itorio. Kaj en aŭstra impero oka-
zis simila fenomeno: la germana
lingvo estis same "paraŝutita" en
Pragon kaj Zagrebon, kiu estis prin-
cipe slavaj urboj.